# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 07/10/2021 Kvincentkvindekunua eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron


Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro*
*lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*
*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Forĵetu viajn vortarojn. Uzu Google Translate kiel vortaron**

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 812,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **280,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **227,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **199,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **106,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde februaro 2022)

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn. *Roger Springer*



**La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.**



**Esperanta Retradio**

La diferenco inter legado kaj aŭdado por la cerbo


4a oktobro 2021

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



## EKSTRAÎOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER"

(de Mason Stuttard). N.ro 55 de "Por Komencantoj".




GRAMATIKAJ KVIZETOIJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). Kun kelkaj laŭ la Fundamento permesitaj ŝanĝoj, la Zamenhof'a sistemo de agovortoj estas perfekta: sen speciala afikso ili senescepte indikas la tutan agon de komenco al fino: manĝas, manĝado, manĝema, senmanĝe. La necesa agvorto kiu estas la kerno de la frazparto "predikato" nomiĝas "verbo" kaj povas en Esperanto finiĝi nur per –as,-is, -os, -us, kaj –u (la infinitivo –i funkcias aŭ kiel verbo, tre malofte, aŭ kiel substantivo).

Ĉiu verbo indikas nur unu agon, kaj ĉiu ago havas nur unu verbon, nur unu vorton. Demando: Donu anglan ekzemplon kie du verboj bezonatas por unu ago.

2). Tiuj simplaj vortoj kun nur unu ago kaj uzataj kiel verbo estas nur la jenaj:
"manĝas" por la prezenco, por indiki la agon okazantan en la nuna tempo;
"manĝis" por la preterito, la tempo antaŭ la nuno"; "manĝos" por la futuro, indikanta la estontecon; "manĝu" por la volitivo, kiu indikas agon deziratan;
"manĝus" por la kondiĉa modo, en kiu oni imagas nerealan agon; kaj
"manĝi" por la infinitivo, kiu povas esti verbo nur kun alia verbo ("Mi ne povas nun manĝi").

Demando: A). Kiam la infinitivo ne funkcias kiel verbo, kiel kio ĝi normale funkcias?
B). Ĉu la prezenco indikas nur la mallongegan nunan momenton?
C). Ĉu ekzemple la ago "naskiĝis" okazis nur antaŭ mallonga tempo?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 551.

*Marcel Leereveld.*

La sekvanta informaĵo venis al mi dank' al Indrani, kaj antaŭe al ŝi, dank' al Brendan.

## Patro diris al siaj tri filoj kiam li sendis ilin al la universitato:

"Mi sentas, ke estas mia devo provizi al vi la plej bonan eblan edukadon, kaj vi ŝuldas al mi nenion pro tio.
Tamen mi volas, ke vi estimu ĝin.
Kiel signo, bonvolu meti po € 1,000 en mian ĉerkon kiam mi mortos "






Liaj filoj fariĝis kuracisto, advokato kaj financa planisto, ĉiu tre sukcesis finance.
Kiam la patro mortis kaj ili vidis lin en la ĉerko, ili memoris lian deziron.
Unue, estis la kuracisto, kiu metis 10 biletojn de € 100 sur la bruston de la mortinto.
Poste venis la financa planisto, kiu ankaŭ metis € 1.000 tien.




Fine, venis la vico de la korŝirinta advokato.
Li serĉis en sia poŝo, elprenis sian ĉekaron, skribis ĉekon por € 3.000, metis la ĉekon en la ĉerkon de sia patro kaj prenis la € 2.000.






Poste li fariĝis politikisto. 😝 😁 *Vera Payne*

**3ZZZ** En la programo de la 4a de oktobro troviĝas informoj pri la Esperanto-movado en Afriko , vidpunkto pri ciferigo de ĉiutagaj agoj kaj virabela lakto ne plu entenos sekreton por vi *Franciska Toubale*



**Artikoloj por AE**. Se vi trovas taŭgan artikolon por AE kaj ne fidas vian Esperantan nivelon, uzu la aŭtomatan tradukilon de Guglo kaj sendu ĝin rekte al AE rogerspringer@tpg.com.au;

# Universala baza enspezo (UBI)



Por pli kontentiga kaj sekura mondo

Ĝi helpus monon flui tra nia ekomonia sistemo sen senutila laboro

Ekonomioj funkcias per la fluo de mono.

Universala Baza Enspezo ebligas ĉiujn havi monon por helpi la fluon de mono.

**Mi kontraŭas militojn.** Nun estas danĝera periodo. Do ĉiuj devas ekscii la veron pri la monda pravigo de milito. Esperantistoj kutime subtenas pacon. La amaskomunikiloj nun nur pravigas militon. Ili mensogas pri la situacio per la elekto de la informoj kiujn ili diskonigas al vi. La regantoj nur ludas ŝakon kaj vi estas la senvaloraj peonoj. Mi provas montri la aliajn flankojn de la mediaj novaĵoj Peticio de Kevin Rudd postulante ke reĝa komisiono ekzamenu la amaskomunikilojn de Murdoch estis prezentita en la parlamento (sbs.com.au) *Roger S*






## Danĝera Militkialo.

(krucmilito1202-1204 kaj aliaj jaroj)

Religio kreas dividon inter homoj, kiuj alie havas malmultajn diferencojn. Ĝi pravigas malamon kaj murdon. Ĝi respondecas pri multaj militoj kaj konfliktoj. Kune kun naciismo ĝi estas la ĉefa kaŭzo de milito

Religion As A Cause Of War – Whistling In The Wind

**Mi serĉis la interreton por kontraŭ militaj Aŭstraliaj politikaj partioj.**

*Australian Citizens Party* *View Email in Browser (enudgemail.com.au)*

Ankaŭ *the Socialist Equality Party*, *SEP* La nunaj politikistoj nur helpas Usonajn militojn

*Roger Springer*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*




# Kompatinda Viktorio.

## MI LOĜAS EN VIKTORIO.

Dum la antaŭaj sesdek jaroj multe travojaĝante tutan Aŭstralion, ni jam frue rimarkis ke Viktorio havas pli da necivilizaciaj aŭtomobilistoj ol la aliaj ŝtatoj. Ankaŭ nun ni povas konstati, ke mia ŝtato havas multe pli da malagrablaj egoismaj kaj kontraŭcivitaj enloĝantoj ol la aliaj ŝtatoj de Aŭstralio. Malgranda grupo de tiaj homoj ekzistas en ĉiuj landoj, kaj faras la vivon de la granda plimulto malfacila. Ilia kontraŭcivitana tendenco ofte ŝanĝeblas, precipe ĉe la interaĝuloj, sed aliaj fariĝas eĉ krimuloj.

En la ĵusaj du jaroj klare montriĝas tiaj egoismuloj, kiam ili malobeas la regulojn por kontraŭbatali la "covid"- virusojn. Estas precipe pro tiuj homoj, ke ni en Aŭstralio havas la virusojn. Kaj estas precipe en Viktorio kie la egoistoj tiom multas kaj tial kaŭzas la grandan virusomultecon. Kial Viktorio havas multe pli da egoistoj ol la aliaj ŝtatoj? Ĉu iu scias? En diktatoraj landoj la registaro sendas ilin al institucio kie oni kuracas ilin, kie oni instruas ilin esti helpemaj al la resto de la civitanoj. En demokrataj landoj oni ne povas perforte devigi ilin esti civitemaj, kvankam en la lernejoj oni povas influi ilin. En Njusaŭzvelso ne estis la civitanoj, sed la registaro kiu helpis la kreskon de la virusoj. Kial ni, viktorianoj, devas suferi pro nenormala multeco de kontraŭcivitanoj? Eble historiisto povas klarigi al ni la originon de tiuj viktoriaj egoistoj.



Formale eĉ la viktoria registaro ne kapablas puni tiujn kiuj ne obeas la civitemajn virusregulojn. Do ili plu faras nian vivon malfacila kaj mortkaŭza. Kompatinda Viktorio!

*Marcel Leereveld.*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



## SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:

1). "She WILL COME at four o'clock" etc. etc. etc.

2). A). Kiel substantivo.

B). Ne, ĝi ofte okazas dum la nuna momento kun iom el la estonto (ekz. "Mi nun pretas por manĝi la fiŝon": "pretas" povas daŭri iun ajn tempon.

C). Ne, ĉar la pasinteco povas esti longe aŭ mallonge antaŭe.

*Marcel Leereveld.*

Mi preferus havi demandojn ne respondeblajn, ol respondojn ne pridubeblajn" "

(*Richard Feynman*)

"Nepripensa respekto al aŭtoritato estas la plej granda malamiko de la vero" *(Einstein).*

En la hispana gripepidemio de 1918-1919 pli ol 50 milionoj da homoj tra la mondo mortis. La ekvivalenta nombro kun la hodiaŭa monda loĝantaro estus ĉirkaŭ 260 milionoj.

Julian Assange ĝuste rimarkas, ke en la pasintaj 50 jaroj ĉiuj militoj ne povus okazi sen la helpo de la amaskomunikiloj.


# AEA-Estrarkunveno 2021-09-30

*Ni pardonpetas, ke ni ne publikigis niajn protokolojn dum multaj monatoj.*

Partoprenis: Sandor, Jonathan, Indrani, Heather, Terry, Bradley (AUS) Bradley, Ivan, Mara (NZ)

(1) Teknika plano por nia hibrida kongreso en januaro

Jonathan prezentis la planitajn teknikajn aranĝojn por nia venonta somerkursaro en Esperanto Domo. Kompreneble ni esperas ke ĝi funkcios.




(2)

**Instruistoj por la somerkursaro:**

Ni diskutis…

Ĉu ni konsideru eŭropanojn (malgraŭ problemoj pri horzonoj)? Ĉu ni movu la lecionojn posttagmezen? ….Ne. La instrutempo restas je la komenco de la tago.

Ni demandu multajn eksterlandajn instruistojn.

**(3) Ideoj por kongres-programo (ĉefe de Jonathan)**

***Ankaŭ VI kontribuu per viaj ideoj!***

**1. "Recentrigi sin": nova formo de diservo**

Tio estus sesio en kiu partoprenantoj faras sin malfermaj kaj ricevemaj. Ĝi komenciĝas per serio de inspirantaj legaĵoj, laŭtlegataj de diversaj homoj. Poste, la faciliganto gvidas la grupon tra la praktiko de korpa kaj mensa malstreĉado. Fine, okazas ĉirkaŭ 15 minutoj da silenta meditado. Kvankam bazita sur religia praktiko, la sesio estas malferma al ĉiu, ĉu religia aŭ nereligia. (Jonathan)

**2. "Vojaĝo ĉirkaŭ nia lando"**

Esperantistoj de diversaj partoj de Aŭstralio registros filmetojn pri siaj lokoj. Post ĉiu 5-ĝis-10-minuta filmeto (aŭ eble je la fino), la filminto respondos al demandoj de la spektantaro. La celo ne estas montri nur la vidindaĵojn de Aŭstralio sed ankaŭ aferojn iom strangajn kaj/aŭ amuzajn. (Jonathan)

**3. "Kuiru kun …"**

Demonstrado de recepto. Same kiel en la virtuala kongreso 2021. Eble estas *aliaj* lertaĵoj, kiujn oni povas instrui? (Ĉu desegnado, denove?) (Jonathan)

Mi iam konsideris prezenti eron pri geometrio sankta kaj en tiu sesio gvidi partoprenantojn desegni per liniigilo kaj cirkligilo simplajn formojn. (Terry)

**4. "Montru kaj rakontu"**

Same kiel en la virtuala kongreso 2021.

**5. Foto-konkurso**

Ni anoncos temon, aŭ eble listo de objektoj, unu el kiuj devos esti en ĉiu foto, je la komenco de la kongreso. La gajnantoj estos anoncataj je la fina evento. (Jonathan)

**6. Arta kaj distra vespero**
Muziko, teatraĵetoj, komedio, oratorado, rakontado, ktp. (Jonathan)

**7. Ludoj (2 horoj)**
Tiuj, kiujn oni ludas virtuale kaj ĉeeste, ekzemple, Tabuo, Pendumilo, Trovu la vortojn, Dixit... (Jonathan)

**8. Kvizo**
Pri Esperanto kaj/aŭ ĝeneralaj aferoj (David)

**9. Verko de artikolo por ESK**
La gvidanto proponos unuan frazon kaj tiam ĉiu partoprenanto devos aldoni frazon, ekzemple "La homo alvenis al la domo kiam subite li aŭdis strangan bruon" kaj tiam oni devas proponi sekvan frazon ktp. (David)

**10. Malferma Mesaĝejo ĉe OurWorldOfText**
La kongreso eble povos havi mesaĝejon ĉe OurWorldOfText. Povos esti privata aŭ publika. Temas pri "senskriba kanvaso" sur kiu iu ajn povas entajpi vortojn. (Mara)

11. **Diskutpunktoj** (estas multaj interesaj ĉi tie)
Ĉu moraleco povas esti pli ol kultura? (Mara)
Ĉu ni nomu Nov-Zelandon Aotearoa? (Bradley)
Ĉu ni povas eviti perforton kontraŭ virinoj? Kiel? (Ĝo)
Eŭtanazio (Jonathan)
Ĉu Esperanto estus pli bona aŭ malpli bona se ĉiuj en la mondo parolus ĝin? (Ĝo)
Kiu estas via persona heroo kaj kial? (Ĝo)
Kiu(j)n konsilo(j)n vi donus al pli juna versio de vi? (Ĝo)

Venonta estrarkunvono:
**Jaŭdon, la 14-an de oktobro je la 17:00 (NSW, QLD, VIC); 16:30 SA**



**Mia utila ĉambro**. Sofo kie mi nun sidas por rigardi la televidon. Ekrano por vidi la kvar eksterajn barilpordojn kaj fiŝejon. Dommanĝa tablo kun medikamentoj kontraŭ maljunecaj problemoj. Farbita fenestro kontraŭ la suno por facile rigardi la televidon *Roger Springer*